

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

La date à retenir

16 février 2013

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE

à 14 h, Centre Jean Vilar (quartier de la Roseraie)
avec la traditionnelle galette

Kelkaj vortoj

La jaro 2013 eble vidos la atingon de la klopodoj de niaj naciaj asocioj por ebligi al Esperanto esti unu el nedevigaj lingvoj en abiturient-ekzameno. Estus granda sukceso, sed ankaŭ nova defio : instrui nian lingvon al estontaj abiturientoj.

Kun tiu espero, mi tutkore deziras al vi kaj al viaj familianoj bonan sanon, ĝojajn jarfinajn festojn kaj ankaŭ bonan kaj feliĉan novan jaron.

Pierre Jagueneau Prezidanto

Quelques mots

L'année 2013 verra peut-être l'aboutissement des efforts de nos associations nationales pour permettre à l'espéranto d'être l'une des langues optionnelles au bac. Ce serait un grand succès mais aussi un nouveau défi à relever : enseigner notre langue à de futurs bacheliers. Avec cet espoir, je vous souhaite ainsi qu'à votre famille, une bonne santé, de très joyeuses fêtes de fin d'année et une très bonne et heureuse nouvelle année.

Pierre Jagueneau, Président

Fabelo far H. C. Andersen

Knabineto kun alumetoj

Estis terure malvarme; neĝo faladis, kaj fariĝis jam vespero; tio estis la lasta vespero en la jaro, vespero de Silvestro. En tiu malvarmo kaj en tiu mallumo sur la strato iris malalta malriĉa knabino kun nekovrita kapo kaj nudaj piedoj. Estas vero, ke ŝi surhavis pantoflojn, kiam ŝi foriris el sia domo; sed ili estis tre grandaj pantofloj, ili antaŭe estis uzataj de ŝia patrino, tiel grandaj ili estis, ke ilin la knabineto perdis, kiam ŝi rapide transkuris la straton, kiam du kaleŝoj kun furioza rapideco pretergalopis; unu pantoflon oni plu ne povis trovi, kaj kun la alia forkuris iu knabo, kiu promesis, ke li uzos ĝin kiel lulilon, kiam li iam havos infanojn.

Tiamaniere la malgranda knabino iradis sur la nudaj graciaj piedetoj, kiuj de malvarmo estis tute ruĝaj kaj bluaj. En sia malnova antaŭtuko ŝi portis amason da alumetoj, kaj unu fasketon ŝi tenis en la mano. En la daŭro de la tuta tago neniu ion aĉetis de ŝi, neniu donis al ŝi almozon. Malsata kaj tremanta de frosto la kompatinda knabineto trenadis sin pluen kaj aspektis jam tute senespera kaj senkuraĝa. La neĝaj flokoj faladis sur ŝiajn longajn blondajn harojn, kiuj en belaj bukloj pendis super ŝia nuko, sed pri tiu ornamo ŝi certe ne pensis. El ĉiuj fenestroj radiis hela brilo de kandeloj, kaj sur ĉiuj stratoj estis sentata laodoro de bongusta ansera rostaĵo. Estis ja vespero de Silvestro, kaj tiu penso okupis ĉiujn sentojn de la malgranda knabino.

En unu angulo inter du domoj, el kiuj unu iom pli elstaris sur la straton ol la alia, ŝi kaŭre sidiĝis.

Siajn malgrandajn piedetojn ŝi subteris sub sin, ŝi tamen ankoraŭ pli suferis de la frosto, kaj malgraŭ tio ŝi ne kuraĝis iri hejmen, ĉar ŝi ne vendis ankoraŭ eĉ unu skatoleton da alumetoj, ne ricevis ankoraŭ eĉ unu speson. Ŝi certe ricevis batojn de la patro, kaj malvarme estis ja hejme ankaŭ; ili tie havis super si nur la tegmenton, kaj la vento akre fajfadis internen, kvankam en la plej grandajn fendojn estis enŝovitaj pajlo kaj ĉifonoj. Ha, kia agrablajo estus nun unu alumeto! Se ŝi nur povus kuraĝi elpreni unu el la skatoleton, ekfroti ĝin je la muro kaj varmigi al si sur ĝi la fingrojn! Fine la infano eltiris unu el la alumetoj, "Riŝ!" kiel ĝi eksplodis, kiel ĝi brulis! La alumeto eligis varman helan flamon, kiel malgranda kandelo, kiam ŝi tenis ĉirkaŭ ĝi sian maneton. Tio estis mirinda flamo; la malgranda knabino havis la impreson, kvazaŭ ŝi sidas antaŭ granda fera forno kun latunaj fermiloj kaj latunaj ornamajoj; la fajro brulis tiel bele kaj varmigis tiel agrable! La knabineto jam etendis siajn piedojn, por varmigi ankaŭ ilin, - tiam la flamo estingiĝis. La forno malaperis, ŝi sidis kun stumpeto de forbrulinta alumeto en la mano.

Ŝi ekbruligis alian alumeton, ĝi brulis, ĝi lumis, kaj tiu loko de la muro, sur kiun falis la lumo, fariĝis travidebla kiel gazo. La rigardo de la knabineto penetris rekte en la ĉambron, kie la tablo estis kovrita per blindige blanka tablotuko kaj delikata porcelano kaj sur ĝi plej bonguste vaporis rostita ansero, farĉita per prunoj kaj pomoj. Kaj kio estis ankoraŭ pli ravanta, - la ansero elsaltis el la plado kaj kun forko kaj tranĉilo en sia dorso

Sekvo paĝo 3

BONAN NOVAN JARON AL ĈIUJ!

Japanaj tagoj

**De la 18-a ĝis la 20-a de septembro :
Du japanaj Esperantistoj en Anĝevo**

Ni deziris akcepti Hori Jasuo kaj Arai Toshinobu kiuj turneis en Francio. Kelkaj inter ni jam renkontis ilin plurajn jarojn antaŭe en Greziljono aŭ dum diversaj kongresoj. Hori Jasuo estas bone konata en la Esperanta movado, interalie pro sia pasio por la muzikiloj kaj ĉefe por la raportoj kiujn li verkis Esperante, tagon post tago sur la reto pri la dramaj eventoj en Fukuŝimo. Bonvenigitaj en la stacidomo la 18-an de septembro posttagmeze, ili vizitis la anĝevan kastelon. Vespere amika renkonto okazis en la ĉambro «Petit Mathurin». Toŝinobu rakontis sian memorindan restadon kiu daŭris unu monaton en ukraina hospitalo, post strat-akcidento. Pli ludema estis la prezentado de Jasuo kiu incis nin al origami-arto. La sekvantan matenon ni rendevuis antaŭ la kastelportalo de Brissac por gvidata vizito. Ĝi estas la plej alta kastelo en Francio kaj la loĝejo de la familio De Cossé Brissac jam de 5 generacioj. Paŝon post paŝo, ŝtuparon post ŝtuparo, niaj japanaj amikoj malkovris kun mirego la grandajn salonojn, manĝoĉambrojn, grandegajn kuirejojn kaj ties kupraĵojn, la ĉarman privatan teatrejon. La vizito finiĝis per gustumado de premiita vino produktita en la duklando de Brissac. Ni profitis la belan sunan veteron por ĝoje promeni ĉirkaŭ la kastelo kaj lasi Toshinobu multe foti, kion li ŝategis. Li estis plena je vigleco kaj viv-ĝojo. La tago daŭris per tagmanĝo en restoracio situanta en trogloditaj keloj kun la malkovro de la tradicia recepto «fouaces» kaj la vizito de la fornejo. Finfine ni vizitis la trogloditan vilaĝon de «Louresse-Rochemenier» kaj ĝian muzeon.

La vespero de la 19-a estis dediĉita al la prelego prezentita Esperante de Hori Jasuo pri la situacio post la katastrofo en



Hori Jasuo kaj Arai Toshinobu dum la prezentado



Ĉiam petolema Hori



Hori Jasuo prezentas terurajn bildojn de la tsunami

Fukuŝimo. Alia asocio nomata «Sortir du nucléaire 49» partoprenis en tiun vesperon en la kunvenejo Hauts-de-St-Aubin en Angers. Bildoprezento ilustris la prelegon tuj tradukitan verve de Laurent kaj Jeanik. Oni malkovris la ĉiutagan vivon en ruinigitaj pejzaĝoj, en lokoj dise kovritaj de ĉiaj ruboj radioaktive poluitaj, pri kiuj oni ne scias kion fari. Ni vidis la suferon de familioj devigitaj disiĝi por trovi laboron, tiun de infanoj ŝlositaj en siaj klasĉambroj apud ne uzataj ludkortoj. Pli kaj pli drame, la farmistoj senesperaj kiuj mortigas sin, la maljunuloj kiuj rifuzas forlasi siajn domojn kaj iĝas tre malsaniĝemaj.

Tamen, niaj du Japanoj plu kapablas miri antaŭ floranta arbo aŭ antaŭ papilio !

Journées japonaises

**Du 18 au 20 septembre :
Deux espérantistes japonais à Angers**

Nous avons choisi d'accueillir Hori Yasuo et Arai Toshinobu en tournée en France. Quelques-uns d'entre nous les avaient déjà rencontrés il y a quelques années à Grésillon ou lors de différents congrès. Hori Yasuo est bien connu du monde espérantiste, entre autres pour sa passion des instruments de musique, et surtout depuis les tristes événements de Fukushima à propos desquels il a envoyé des compte-rendus en espéranto, jour après jour sur internet.

Accueillis en gare d'Angers, l'après-midi du 18, ils ont pu faire la visite du château. Une petite rencontre amicale a eu lieu en soirée à la salle du Petit Mathurin. Toshinobu nous a raconté son séjour mémorable, suite à un accident de la circulation, dans un hôpital d'Ukraine durant presque un mois. Plus ludique fut la prestation de Yasuo qui nous initia à l'origami.

Le lendemain matin, rendez-vous était donné dès 10h aux grilles du château de Brissac pour une visite guidée de celui-ci, le plus haut de France et demeure des Ducs de la famille De Cossé Brissac depuis 5 générations. Pas à pas, escalier après escalier, nos amis japonais découvrent avec émerveillement les grands salons et salles à manger, les cuisines monumentales et leurs cuivres, les chambres d'apparat aux tapisseries exceptionnelles, le ravissant petit théâtre privé...

La visite intérieure s'achève dans les caves voûtées où nous bénéficions d'une dégustation d'un vin rosé, primé, dont la récolte provient des vignobles appartenant au duché de Brissac. La visite extérieure nous conduira au souterrain en eau dont la construction avait été pensée pour protéger le village des inondations de l'Aubance. La visite du parc fut très joyeuse et animée. La journée était très ensoleillée avec un ciel particulièrement bleu. Nous nous attarderons pour de nombreuses photos ; Toshinobu affectionne particulièrement la prise de vue. De plus, il déborde de vivacité et de joie de vivre. La journée se poursuivra, tout aussi joyeuse par un repas dans les caves troglodytes de Rochemenier avec découverte "des Fouaces" et visite du four. Nous terminerons cette escapade angevine par la traversée pédestre du village de Louresse-Rochemenier et la visite de son musée.

La soirée du 19 sera consacrée, salle des Hauts-de-St-Aubin à Angers, à la conférence en espéranto présentée par Hori Yasuo sur l'après Fukushima. Nous l'organisons en partenariat avec l'association : "Sortir du nucléaire 49". Un diaporama accompagnera la conférence retraduite instantanément et avec brio par Laurent et Jeanik. On découvre le quotidien dans des paysages dévastés, sur des lieux jonchés de détritus en tout genre contaminés par la radioactivité et dont on ne sait que faire, la souffrance des familles obligées de se séparer pour trouver du travail, celle des enfants enfermés dans leurs salles de classe jouxtant des cours de récréation où plus personne ne va jouer. Pire encore, les fermiers, sans espoir, qui se suicident et les vieux, résignés, qui ne veulent pas quitter leur maison et restent désormais très fragilisés. Et pourtant, nos deux Japonais savent encore s'émerveiller devant un arbre en fleurs, un papillon !

La 12-an de septembro : Publika debato kun postvivantino el Hiroŝimo "Supervivi post Hiroŝimo"

La membroj de la Anĝeva Kultura Centro de Esperanto estis invititaj de la Kolektivo de la paco-movado por partopreni, en la kunveno "Claude Chabrol", en la bildoprezento kaj atesto de postvivantino post la nuklea bombado en Hiroŝimo. La celo estis alporti subtenon al la klopodo de 208 urbestroj el Maine-et-Loire kiuj subskribis la alvokon por nuklea malarmado iniciate de la urbestro de Hiroŝimo.

Kyoko Hama estis 6-jaraĝa kiam la milito kontraŭ Ĉinio ekis. 12-jaraĝe, ŝi loĝis kun sia patrino en la japana haveno Osako (ŝia patro mortis malsane kiam ŝi estis tre juna). Ŝi estis 20-jaraĝa kiam ŝia urbo suferis aerajn atakojn la 13-an de marto 1945. Tra-irante Osakon ĉirkaŭitan de fajro, ŝi forfuĝis kun sia patrino kunprenante paneton por nura manĝaĵo. Ili kuris al akvo por ne brulmorti. Ili rifuĝis en Hiroŝimo. La suno brilis tiun tagon kiam fulmibrilego ŝprucis... Kyoko estis en tiu infero kiam nigra radioaktiva pluvo falis : mortiga pluvo super Hiroŝimo.

Kyoko manprenis sian destinton kaj postvivis :

"Postvivi kontraŭ la malamo kaj la milito, postvivi por poste bone vivi sur nia tero, postvivi por kanti la esti-ĝojon" (eltirita el la bildoprezento)

Kyoko estas nun 86-jaraĝa. Krom militobildoj, ŝia atesto estas grandega



mesaĝo de espero.

Ŝi konkludis dirante :

"Mi havis la volon postvivi. Mi havas la respondecon transdoni mian sperton al junaj generacioj.

Neniam estigu la militon, nek en Japanio, nek en la cetera mondo !

Neniu estu viktimo kiel mi estis ! Neniu en la mondo estu submetata al radioj !"

Le 12 septembre : débat public autour d'une survivante d'Hiroshima "Survivre après Hiroshima"

Les membres du Centre Culturel Angevin d'Espéranto étaient invités par le collectif du mouvement de la paix à assister, salle Claude Chabrol, au diaporama et témoignage d'une survivante au bombardement nucléaire d'Hiroshima. Le but était d'apporter un soutien à la démarche de 208 maires du Maine-et-Loire qui ont signé l'appel au désarmement nucléaire à l'initiative du maire d'Hiroshima.

Kyoko Hama avait 6 ans quand la guerre contre la Chine a commencé. A 12 ans elle vit avec sa mère à Osaka, un port du Japon (malade, son père est mort lorsqu'elle était très jeune). Elle a 20 ans quand sa ville subit, le 13 mars 1945, les attaques aériennes. Traversant Osaka cernée par le feu, elle s'enfuit avec sa mère en emportant pour seule nourriture un petit pain. Elles courent vers l'eau pour ne pas mourir brûlées.

Elles trouveront refuge à Hiroshima. "Il faisait beau ce jour-là à Hiroshima quand un éclair jaillit... Kyoko est là dans ce nouveau monde d'enfer quand une pluie noire, radioactive, s'abat cette nuit-là : une pluie mortelle sur Hiroshima".

Kyoko prit avec force son destin en main, Kyoko a survécu :

"Survivre contre la haine et la guerre, survivre pour bien vivre ensuite sur notre terre, survivre pour chanter la joie d'être" (extraits du diaporama).

Kyoko a maintenant 86 ans. Au-delà des images de guerre, son témoignage est un formidable message d'espoir.

Elle conclut en disant :

"J'ai eu la volonté de survivre. J'ai la responsabilité de transmettre aux jeunes générations mon expérience.

Ne provoquez jamais la guerre, ni au Japon, ni dans le reste du monde !

Que personne ne soit victime comme je l'ai été !

Que personne ne soit irradié dans le monde !"

Sekvo de la paĝo 1

balanciĝante ekiris sur la planko; ĝi iris ĝuste en la direkto al la malriĉa knabino. Sed la alumeto estingiĝis, kaj oni vidis plue nur la dikan malvarman muron.

Ŝi ekbruligis novan alumeton. Kaj jen la knabineto sidis sub plej belega Kristnaska arbo; ĝi estis ankoraŭ pli granda kaj multe pli riĉe ornamita ol tiu, kiun ŝi en la sankta vespero vidis tra la vitra pordo ĉe la riĉa komercisto. Miloj da kandeloj brulis sur la verdaj branĉoj, kaj mikskoloraj bildoj, similaj al tiuj, kiuj estis ekspoziciitaj en la fenestroj de la magazenoj, rigardis sur ŝin; la knabineto etendis al ili ambaŭ manojn, - tiam la alumeto estingiĝis. La multo da Kristnaskaj kandeloj leviĝis pli kaj pli alten, kaj nur nun ŝi vidis, ke tio estis la helaj steloj. Unu el ili falis malsupren kaj trenis post si tra la ĉielo longan strion da fajro. "Nun iu mortas!" diris la

knabineto, ĉar la maljuna avino, kiu sola estis afabla en rilato al ŝi, sed nun jam delonge plu ne vivis, estis dirinta: "Kiam stelo falas, tiam unu animo leviĝas al Dio."

Ŝi frotis denove unu alumeton je la muro; ĝi ĵetis ĉirkaŭ sin vastan lumon, kaj en la brilo de ĉi tiu staris la maljuna avino, hele prilumita, milda kaj afabla.

"Avineto!" ekkriis la infano, "ho, prenu min kun vi ! Mi scias, ke vi malaperos tuj, kiam la alumeto finiĝos, vi malaperos, kiel la varma forno, la bongusta ansera rostaĵo kaj la granda briletanta Kristnaska arbo !" Rapide ŝi ekbruligis la tutan restaĵon de la alumetoj, kiuj ankoraŭ troviĝis en la skatoleto, ŝi volis reteni la avinon; kaj la alumetoj disvastigis tian brilon, ke estis pli hele ol en luma tago. Tiel granda, tiel bela la avino neniam estis; ŝi prenis la malgrandan knabinon sur sian

brakon, kaj ili ekŝvebis alten en brilo kaj ĝojo; malvarmo, malsato kaj timo malaperis, - ili estis ĉe Dio.

Sed en unu angulo ĉe la domo en la malvarma matena horo sidis la malgranda knabino kun ruĝaj vangoj, kun rideto ĉirkaŭ la buŝo, - sen viva, frostiĝinta en la lasta tago de la jaro. La mateno de la nova jaro leviĝis super la malgranda kadavro, kiu sidis kun la alumetoj, el kiuj preskaŭ unu tuta skatoleto estis forbruligita. "Ŝi volis sin varmigi!" oni diris. Neniu sciis, kion belan ŝi vidis, en kia brilo ŝi kun la maljuna avino eniris en la ĝojon de nova jaro.

H.C. Andersen

Tradukis L.L. Zamenhof

Fonto : www.steloj.de/esperanto/verkoj.html

En Milano, ĝardeno tute dediĉita al Esperanto kaj L.L. Zamenhof

Mi prezentas min. Mi estas Giovanni (Johano) Conti (Konti), por la amikoj Gianni (Ĝani).

Mi loĝas en Cormano, apud Milano, en strato F. Filzi, 51.

Post profesia laboro, mi estas pensiulo kaj finfine mi povis realigi kelkajn malnovajn revojn. Inter miaj multaj revoj, la plej grava estas la lingvo ESPERANTO.

Ĝi estas revo kiu estiĝis en fora paseo, en la jaroj 1948/49, kiam mi estis 16/17-jaraĝa. Mi aliĝis al movado "Mondcivitanoj", kiu adoptis Esperanton, kiel internacian lingvon kaj pro tio mi aĉetis gramatikon. Nur kelkajn paĝojn de ĝi mi sukcesis legi. Post 50 jaroj, foliumante revuon, jen reaperis... Esperanto! Mi aliĝis al kursoj kaj aĉetis gramatikojn kaj librojn. De tiu momento mi komencis mian aventuron kun la internacia lingvo! Mi ekstudis ĝin (ĝi estas tre facila) kaj post nur tri jaroj, mi komencis ankaŭ instrui ĝin ĉe la Universitato de la tria aĝo, kie mi transdonis mian entuziasmon por tiu ĉi lingvo al multaj bonvolemaj lernantoj.



Kelkaj artistoj dediĉas siajn verkojn al granda idealo... Mi volis dediĉi mian ĝardenon al Esperanto.



Inter la nombraj ellaboraĵoj en la ĝardeno : granda libro el ligno (20 kg.), kiu enhavas partojn el paroladoj de Zamenhof de la unuaj tri kongresoj de Esperanto. Sube en la paĝo estas aŭtentika subskribo de Zamenhof kun fama frazo. Sub la traduko en la itala, estas mano de juna virino turnanta la paĝojn de la libro.

Exemple de réalisations du jardin : un grand livre en bois (20 kg.) contient des extraits des discours de Zamenhof des 3 premiers congrès d'espéranto.

On trouve en bas de page un phrase célèbre de Zamenhof en espéranto. Sous la traduction en italien une main de jeune femme tourne les pages du livre.

<http://www.giardinoesperanto.com>

A Milan, un jardin entièrement dédié à l'espéranto et à L.L. Zamenhof

Je suis Giovanni Conti, Gianni pour les amis. J'habite à Cormano, près de Milan, 51 rue F. Filzi.

Après mon activité professionnelle, j'ai pris ma retraite et put finalement réaliser quelques vieux rêves. Parmi ceux-ci, le plus important était l'espéranto. C'est un rêve qui est né dans les années 1948/1949 quand j'avais 16/17 ans. J'ai adhéré au mouvement "citoyens du monde" qui avait adopté l'espéranto comme langue

internationale, et pour cela j'ai acheté une grammaire. Je n'ai réussi qu'à en lire quelques pages. 50 ans plus tard, en feuilletant une revue, voici qu'est réapparu... l'espéranto! Je me suis inscrit à des cours et ai acheté des grammaires et des livres. A partir de ce moment mon aventure avec la langue internationale a commencé! Je me suis mis à l'étudier (elle est très facile) et après seulement trois ans j'ai pu l'enseigner à l'université du troisième âge, où j'ai transmis mon enthousiasme pour cette langue à de nombreux élèves volontaires. Quelques artistes consacrent leur œuvre à l'espéranto... J'ai voulu dédier mon jardin à l'espéranto.

diversaĵoj


Prezentado de la Internacia lingvo en supera lernejo

La 18-an de oktobro, kiel ĉiujare, Pierre Jagueneau kaj Jeanik Marolleau prezentis la Internacian Lingvon al lernantoj (estontaj interpretistoj kaj tradukistoj) de supera lernejo privata UCO, kadre de normala kurso de la profesoro S-ino Favreau. La demandoj, kiuj sekvis la kurson, estis tre interesaj.

Renaskiĝas Scienca Revuo rete kaj papere!

La plej malnova kaj unu el la plej prestiĝaj Esperanto-revuoj "Scienca Revuo" revekiĝas post sia lastatempa dormo, jam eĉ en moderna, interreta formo! Ekde nun Scienca Revuo denove legeblas, ĝi estas trovebla ĉe la adreso:
<http://www.sciencia-revuo.info>
En la retejo aperos jare kvar numeroj en elektronika formo, kaj jarfine

aperos ankaŭ papera volumo, kunigonta ĉiujn dumjare aperintajn artikolojn.



Estraro de ISAE invitas legi la unuan retan numeron, kaj invitas sendi viajn sciencajn artikolojn por publikigo. La redaktadon de la retejo kaj de la gazeto prizorgas Johannes Mueller el Germanio, al kiu sinceran gratulon pro la farita granda laboro!

Szilvási László

Publika prezentado de Esperanto

Ĉiujare nia Esperanto-asocio en Angers organizas publikan prezentadon pri la internacia lingvo. Ĉi-jare dufoje ĝin ni okazigis, la 6-an kaj la 26-an de septembro, kaj tiel ni havis la plezuron rekte babili per Skajpo (aŭdvida interreta kontakto) kun samideanoj el 6 landoj : Bruce (Kanado), Heather (Britio), Martin kaj Mallely (Meksiko), Naga Siva (Barato), Regis Castro (Brazilo) kaj Uriel (Nikaragvo).

Interŝanĝi kelkajn vortojn kun homoj el diversaj landoj estis sperto, kiu pruvas kiom facile eblas internaciskale komuniki dank'al Esperanto. Tiun momenton pliagrabilis frandaĵetoj preparitaj de Geneviève.

Sed la respondenda demando plu restas :

Kiel konsciigi la civitanojn ke, por internacie komuniki, ekzistas ne nur la angla lingvo, sed ankaŭ bonega rimedo Esperanto ? Ja utilas memorigi tion :

Komunikado per Esperanto estas malmultekosta

Eĉ eblas senpage lerni per Interreto !

Komunikado per Esperanto estas rapida

Nur kelkaj monatoj estas necesaj por ekparoli kaj ekkorespondi.

Komunikado per Esperanto estas justa

Oni ne uzas superregantan lingvon por komuniki.

Scipovo de Esperanto faciligas lernadon de aliaj lingvoj (propedeŭtika rolo).

<http://claudepiron.free.fr/articlesenfrancais/tremplin.htm>

Tiom da klarigindaj argumentoj por diskonigi tiun eksterordinaran komunik-rimedon !

Chaque année, notre association d'espéranto à Angers organise une présentation publique de la langue internationale. Nous l'avons réalisée deux fois cette année, les 6 et 26 septembre et, ainsi, avons eu le plaisir de pouvoir bavarder en direct par Skype (contact audio et vidéo sur internet) avec des espérantophones de 6 pays : Bruce (Canada), Heather (Grande-Bretagne), Martin et Mallely (Mexique), Naga Siva (Inde), Regis Castro (Brésil) et Uriel (Nicaragua).

Echanger quelques mots avec des correspondants de divers pays fut une expérience qui démontre avec quelle facilité on peut communiquer à l'échelle internationale grâce à l'espéranto. Ce moment fut agrémenté par des gourmandises préparées par Geneviève. Mais la question que nous devons nous poser demeure :

Comment faire prendre conscience aux citoyens que, pour communiquer internationalement, il n'y a pas que l'anglais mais également l'excellent moyen qu'est l'espéranto ? En effet, il est toujours utile de rappeler que :

La communication par l'espéranto est économe

Il est même possible d'apprendre gratuitement sur Internet !

La communication par l'espéranto est rapide :

Seulement quelques mois sont nécessaires pour pouvoir parler et correspondre.

La communication par l'espéranto est équitable :

On n'utilise pas une langue dominante pour communiquer.

La connaissance de l'espéranto facilite l'étude d'autres langues (rôle propédeutique).

<http://claudepiron.free.fr/articlesenfrancais/tremplin.htm>

Autant d'arguments à développer pour promouvoir ce formidable moyen de communication !

Sugesto por agrablaj Esperantaj ferioj...



JARFINA FESTEGO KUN SILVESTRA-NOVJARA FESTENO



okazos la 3an fojon en la franca
Esperanto-kastelo Gresillon
de la 28-a de decembro 2012
ĝis la 2a de januaro 2013

Detalo : www.gresillon.org/jarfino
Kontakto: +33-2.41.89.10.34
kastelo@gresillon.org

MCE Gresillon
49150 SAINT MARTIN D'ARCE



La reta tradukilo de Google nun funkcias ankaŭ en Esperanto

La giganto el la interretaj entreprenoj, Google, finfine aldonis Esperanton inter la idiomoj tradukeblaj pere de ĝia sistemo. De nun Google Translate proponas ankaŭ tradukojn en la internacian lingvon.

Google daŭre demonstris sian apogon al Esperanto uzante ĝin kiel selekteblan lingvon ĉe aliaj servoj, kiel ekzemple la ĉefpaĝo en internacilingva versio, kaj ebligante ĉion en

Esperanto. Por aliri la E-version de la programo Google Translate, bonvolu iri al la jena adreso :

<https://www.google.com/webhp?hl=eo>



L'outil de traduction de Google fonctionne aussi en espéranto

La gigantesque entreprise d'internet Google a finalement ajouté l'espéranto aux langues traduisibles par son système.

Google continue de démontrer son soutien à l'espéranto en l'utilisant comme langue

disponible sur son serveur. Pour atteindre la version espérantiste du programme "Google Translate", utilisez ce lien :

<https://www.google.com/webhp?hl=eo>



Jam la 10-a eldono de la nova Anĝeva Folio !



La teamo,
Genevieve kaj
Jean-Yves, kiu
zorgas ekde majo

2010 pri la Anĝeva Folio plezure
festas ĝian 10-an eldonon kaj
proponas al vi kuniĝi por riĉigi
nian bultenon kaj plibonigi ties
enhavon. Verku raportojn,
rakontetojn, ŝercojn, receptojn,
eĉ bildstriojn aŭ desegnaĵojn....

Sendu viajn proponojn al :

Jean-Yves Grille, 6 rue de Beaumont, 49140
Villevêque - aŭ retmesaĝe : jy.grille@orange.fr

21 SEPTEMBRE : LA JOURNÉE INTERNATIONALE DE LA PAIX

s'est déroulée place de la paix à Angers. Les stands se côtoient en un milieu restreint, sous barnum, mais chaleureux.

Le mot d'accueil est prononcé par Marinette Prouteau du collectif pour la Journée de la Paix.

Puis un discours sur la paix, en espéranto, est lu par Pierre Jagueneau, notre président du CCAE, suivi d'une traduction en français par un membre du collectif précité.

Le temps fort de cette rencontre sera la lecture d'un conte accompagné à la contrebasse, imaginé sur les paroles d'un survivant aux bombes nucléaires et sur les instants qui les entourent : description lourde, "atrocité à l'état pur". L'émotion est perceptible sous ce barnum. L'assistance est muette, retenant son souffle, voire quelques larmes.

Après un pique-nique partagé dans les cuisines des Greniers St-Jean, ouvertes aux participants en raison des mauvaises conditions météo, un spectacle de



chants algériens avec le groupe Adriss clôturera cette fête de la paix (cette année, la fête de la paix correspondait avec le 50ème anniversaire pour la paix et l'indépendance de l'Algérie).

2 OCTOBRE : LA MARCHÉ DE LA NON-VIOLENCE LE CROISIC-PARIS

organisée par les associations "La Paix en marche" et "Gandhi International". Cette marche fit une halte dans notre région. Nous avons décidé de soutenir leur action par la présence du groupe espérantiste.

Laurent accompagna de ses pas l'étape de

Savennières à Angers.

La banderole du groupe espéranto, confectionnée par Pierre, souhaitait la bienvenue aux marcheurs lors de leur arrivée à la salle "Claude Chabrol".

Ce fut quelques minutes de surprise pour certains, des sourires amusés et complices pour d'autres, voire quelques mots d'échanges en attendant le film programmé : "La marche des Gueux". Sa présentation fut suivie d'un débat sur la précédente marche non-violente en Inde, dont les médias n'ont malheureusement pas fait écho.



Ni ludis

Ni ludas

Horizontale :

- 1) Ŝtelmalsano (sf).
- 2) Rapidaj, multetonelaj ŝipoj.
- 3) Li mortigis Minotaŭron – Periodo de la naskiĝo al la morto.
- 4) Batalejo aŭ ludejo (sf) – Nedaŭra kutimo pri vestado (sf).
- 5) Tradicia japana vesto – Seksa inklinio al iu (sf).
- 6) Turniĝo de aviadilo (sf) – Orcino (sf) – Virino aŭ femalo (sf).
- 7) Krucbekulo.
- 8) Virino kiu praktikas sporton (sf).
- 9) Granda malpreciza longo – Plurala pronomo.
- 10) Kapo de orcino ! – Maranaso.

Vertikale :

- A) Naturkatastrofo.
- B) Granda usona lago – Ĝi montras organon aŭ membron, kiun oni uzas por fari ion.
- C) Agoj, personoj, rigardataj, kiel imitindaĵoj.
- Ĉ) La tuta enhavo de io – Kudrita rando de ŝtofo.
- D) Montra pronomo – Poemoj de A. de Musset.
- E) Sufikso montranta kolektivecon – Informi per signoj kaj punktoj.
- F) Marbirdo – Milde, delikate tuŝi (sf).
- G) Tre seka, dezerta – (Inv) Tradicia rakonto pri la dioj aŭ praavoj.
- Ĝ) Ĵus aperinta (sf) – Komenco de milito ! – Ĉilio sen okcidento kaj sen eosto !
- H) Heroo biblia (sf) – Malpli ol iomete.

N° 15	1	KRONOMETRO	A	KOMPLIMENT
	2	KOKINO	B	ORATORIO
	3	MOTOR - TILD	C	OKTOBR - IAM
	4	PRO - FERIO	Ĉ	NOO - IIRK
	5	LABIRINTO	D	OKR - KO
	6	ITRI - LIANO	E	MI - FILINO
	7	MO - RUI - PAL	F	ENTENI - ARM
	8	ERIK - NA - NI	G	TOIRTAP
	9	NIA - KOR - OV	Ĝ	LIONANOJ
	10	TOMBO - MAJO	H	ORDO - OLIVO

N° 16 (sf) : sen finaĵo (Inv) : inverse Ŭ = U

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

Les cours d'Esperanto ont repris à Angers !

les mercredis à 18h30
les jeudis à 18h30

Salle du Petit Mathurin,
avenue Jean XXIII à Angers

Bienvenue
à tous
pour découvrir,
apprendre,
pratiquer,
jouer...

Renseignements au
02.41.73.17.97



Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers
Tél. 02 41 73 17 97
Courriel : info@esperanto-angers.fr

Vous informer

www.esperanto-angers

www.esperanto-france.org
www.esperanto-jeunes.org
www.uea.org
www.esperanto.net

Kalendaro

Selektitaj Esperantaj renkontoj en februaro, marto, aprilo 2013

17 - 26. februaro

19-a Korusa Staĝo en Bastide-sur-l'Hers, Francio.
Inf.: Tutpeko ĉe aliceadsl.fr

18 - 25. februaro

19-a E-korusa staĝo ĉe Pireneoj, ie norde de Andoro.
La 19-an fojon ni aranĝas tutsemajnan korusan staĝon sub gvidado de esperantlingva korusestro Xavier Rodoni Morera, kantisto de la famega muzik-grupo Kaj Tiel Plu. Eblos ĉiutage kanti 5 horojn, ankaŭ E-ludi, post-tagmeze skii aŭ sieti, turisme vizitadi, ktp. Inf.: Tutpeko ĉe Jorgos Esperanto - Mirevia - FR-11420 Lafage, Francio.
Rete: tutpeko@aliceadsl.fr

22 - 24. februaro

Esperanto-konferenco en Alikanto, Hispanio. Printempo dumvintro en la mondfama mezmaro urbo kun subtropika klimato. Esperanto, kulturo, librobazaro, feriado. Antaŭ- (18-19. febr.) kaj postaranĝoj (25-26. febr.). Inf.: Verde Vivi, Querstr. 11, DE-66287 Quierschied, Germanio.
Tel.: +49-171-6972721 - Rete: drfdj@web.de

22 - 26. februaro

6-a Vintra Internacia Semajno por Esperantistoj (V.I.S.E) en Buŝteni, Rumanio. Okaze de Semajno de Internacia Amikeco, ni invitas vin pasigi kelkajn tagojn de la jaro 2013 en belega etoso, kune kun la membroj de E-klubo "Amikeco" el Braŝovo, Rumanio. La programo estas por skiemuloj, sed ankaŭ por neskiistoj! Inf.: Rodica Todor, B-dul Valea Cetății 22, bl. B 24, sc. A, ap. 5, RO-500289-Brașov, Romania - Rete: rodica_todor@yahoo.com

25. februaro - 3. marto

Mediterranea Esperanta Semajno 2013 en St Raphaël, Résidence Val d'Esquière - Les Issambres, Francio. Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro! Inf.: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR-83700 Saint-Raphaël, Francio.
Rete: prezmoni@hotmail.com; tel. +33(0)494830688

25. februaro

Semajno de Internacia Amikeco en Leuven, Belgio. Tutlanda (kaj pli) Festo de Semajno de Internacia Amikeco. Temo: Esperanto kaj Interreto.
Inf.: Esperanto 3000 info@esperanto3000.be

5 - 9. marto

Esperanto-intensa kurso en Herzberg (kun Popolaltlimejo en Osterode) en Esperanto-Centro Herzberg/Harz, Germanio. Inf.: Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz - la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, Germanio. Tel.: +49-(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de

7 - 11. marto

Bibliaj Tagoj en Trento, Italio. Ekumenaj bibliaj tagoj kunigas kristanajn aŭ almenaŭ spirite malfermajn esperantistojn por okupiĝo pri tekstoj el la Biblio, ekskursoj kaj ekumenaj rilatoj (katolika, protestanta, ortodoksa), kaj kantado i.a. el la ekumena kant- kaj preĝlibro "Adoru". Inf.: Stefan Lepping, Mellinstr.5, DE-59457 Werl, Germanio. Rete: stefanlepping@gmx.de

31. marto - 2. aprilo

II-a Internacia Festivalo de Esperanto-kanto, Recitado, Oratora Konkurso en Karlovo-Sopot Bulgario. Inf.: Esperinform, BG-4300 Karlovo p.k.44, Bulgario.
Rete: leonov@rozabg.com (prefere skribu rete).
Tel.: +359 885056469 kaj +359 335 9 3933 (vespere)

2 - 9. aprilo

28a Printempa Semajno Internacia - PSI en Bonn, Germanio. Feriosemajno kun kursoj, ludoj, ekskursoj kaj kultura programo, ĉefe por familioj kun infanoj. Inf.: Dr.

Jörg Gersonde, Hermann-Wäschke-Str.31, DE-06366 Köthen, Germanio. Rete: psi@esperanto.de

5 - 12. aprilo

3-a printempo en Marienburg, Zell/Mosel, Germanio. Venu ĝui la printempon! Pasigu agrablajn paskajn tagojn en belaj domoj kaj pejzaĝoj! Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio.
Rete: lu.esperantoland@gmx.de

7 - 10. aprilo

67-a Kongreso de SAT-Amikaro en Châteauroux, Francio. Inf.: satam.kongres67@free.fr

10 - 13. aprilo

Praktikado de la lingvo kaj historio de la Esperantomovado kun Miguel Ángel González Alfonso el Kubo en la Kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Inf.: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. Rete: informoj@kvinpetalo.org

13 - 21. aprilo

Printempa Semajno en Baugé, Francio. Seminario mondvojaĝantoj, intensaj kursoj por progresantoj kaj instruantoj. Inf.: Jannick Huet, Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio. Tel.: +33-2.41.89.10.34
Rete: kastelo@gresillon.org

19 - 26. aprilo - 18. majo

37-a Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kun 41-a Sesio Internacia Akademio de la Sciencoj (AKB/AIS). Diversaj studumoj por vojaĝgvidantoj, ĉiĉeronoj, diplomatoj. Inf.: Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando, tel./faxo: +48-52-346-11-51 - Rete: stud-esperanto@wp.pl aŭ andreo@rubikon.net.pl

20 - 22. aprilo

107-a Skota kaj 93-a Brita kunkongreso de Esperanto en Edinburgh, Britio. La organiza skipo promesas provizi la kongresanojn per ne nur interesa Esperanto-programo, sed ankaŭ per pluraj ekskursoj ĉirkaŭ tiu magia histori plena urbo. Inf.: Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, Britio. Tel.: 0845 230 1887, Rete: eab@esperanto-gb.org

21 - 28. aprilo

Fringoj por infanoj en Greziljono, Francio. Inf.: Esperanto-KulturDomo, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio. Telefono-respondilo: +33-2.41.89.10.34, Rete: kastelo@gresillon.org

23 - 28. aprilo

4-a Esperanto-Semajno en Nilvange, Francio. Kursoj por progresantoj, konversacia kurso, prelegoj, filmoj, ekskursoj ĉe la tri landlimoj de LU, FR kaj BE. Inf.: Esperanto-Thionville kaj Franca Fervojista Esperanto Asocio. Inf.: Bruno HENRY, 8 rue Pasteur, FR-57240 Nilvange, Francio.
Rete: esperanto-thionville@laposte.net

24 - 28. aprilo

Preparado al la scienc-teknika branĉo de la kapableco kun Kladuo Roux kaj Vinko Markovo en la kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Inf.: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio.
Rete: informoj@kvinpetalo.org

27. aprilo - 1. majo

Krokodila Renkontiĝo 2012 en Arrout, Francio. 4 tagoj da umado en Pirinea montara vilaĝo. Inf.: Christophe Chazarein, 98, rue Riquet, FR-31000 Toulouse, Francio.
Rete: krokodila2012@gmail.com

Fonto: <http://www.eventoj.hu>